WIKIPEDIA

Livona lingvo

La **livona lingvo** (*līvõ kēļ*, ankaŭ *rāndakēļ*) estas ano de la finna branĉo de la Finn-ugra lingvaro. Laŭ ĝi la historia regiono Livonio ricevis sian nomon. Nuntempe, la livona estas parolata de nur 10-40 personoj en Latvio kaj ĝin minacas malapero. La lastaj parolantoj de la livona lingvo loĝas en marbordaj vilaĝoj, norde de Kuronio, proksime al la urbo Ventspils.

Laŭ esploroj pri loknomoj la livona estis pli frue parolata en pli vasta areo, kiu kovris ĉ. duonon el la teritorio de nuntempa Latvio. La latva lingvo havas multe da influo de la livona lingvo kaj la diferencoj inter la latva kaj la litova estas parte pro la influo de la livona lingvo. Ankaŭ la latva lingvo influis multe al la livona kaj kaŭzis diversajn malsimilecojn inter la livona kaj aliaj finnaj lingvoj.

La livona lingvo dividiĝis al du dialektoj, la orienta kaj la okcidenta. La orienta livona lingvo estis parolata oriente de la Riga golfo kaj ĝi malaperis en la 19-a jarcento.

Livona lingvo	
līvõ kēļ	
Parolata en	Latvio
Parolantoj	10 - 40
Skribo	latina alfabeto
Lingvistika klasifiko	
Urala	
Finn-Ugra	
Finna-samea	
Baltmara finna	
Livona	
Oficiala statuso	
Oficiala lingvo en	Nenie
Lingvaj kodoj	
Lingvaj kodoj	
ISO 639-2	fiu
ISO 639-3	liv
SIL	LIV
Glottolog	livv1244
Angla nomo	Livonian
Franca nomo	live

Regionoj loĝataj de livonoj en 12-a jarcento (griza) kaj komence de 20-a jarcento (nigra).

Enhavo

Alfabeto
Historio
Bazaj frazoj
Aliaj projektoj
Eksteraj ligiloj
Vidu ankaŭ

Alfabeto

La livona estas skribita per latina alfabeto kun kromaj literoj:

A/a, Ā/ā, Ä/ä, Ǟ/ǟ, B/b, D/d, Ḑ/ḑ, E/e, Ē/ē, F/f, G/g, H/h, I/i, Ī/ī, J/j, K/k, L/l, Ļ/ļ, M/m, N/n, Ņ/ņ, O/o, Ō/ō, Ȯ/ȯ, Ȱ/ȱ, Õ/õ, Ȱ̃/ȱ̃, P/p, R/r, Ŗ/ŗ, S/s, Š/š, T/t, Ţ/ţ, U/u, Ū/ū, V/v, Z/z, Ž,ž.

Historio

Dum la 13-a jarcento troviĝis 30 000 parolantoj de la livona kaj dum la 19-a jarcento ankoraŭ 2 000. Post la sendependiĝo de Latvio la livona kulturo ekfloris. Dum la 1930-aj jaroj la livona estis uzata en literaturo. La Sovetunia epoko, kun i.a. limigoj por la loĝantoj de marbordaj regionoj, kaŭzis fortajn batojn al la livonaj vilaĝoj. Parto el la parolantoj ekloĝis en urboj, inter alie en Rigo.

Bazaj frazoj

Tulgid mäd jūrõ!
: Venu al ni!

Esperanto um nei lā̆lam!
: Esperanto estas tiel malfacila!

Jõvīst, ku rõkāndõd līvõ kīeldõ.
: Bone, ke vi parolas livone.

Set veitõ.
: Nur iom.

Nēmizpā̆l!
: Ĝis revido!

Tēriņtš
: Saluton!

Jõvā ūomõg! / Jõvvõ ūomõgt!
: Bonan matenon!

Jõvā pā̆va! / Jõvvõ päuvõ!
: Bonan tagon!

Põlaks!
: Bonvolu!

Tienū!
: Dankon!

Vȯndzist Ūdtāigastõ!
: Bonan novan jaron!

ikš, kakš, kuolm, nēļa, vīž, kūž, seis, kōdõks, īdõks, kim
: unu, du, tri, kvar, kvin, ses, sep, ok, naŭ, dek

Aliaj projektoj

Eksteraj ligiloj

- http://www.livones.lv/
- http://liedags.blogs.lv/
- http://web.archive.org/20050129100517/homepage.mac.com/uldis/livonia/livonia.html (virtuala Livonio)

Vidu ankaŭ

- la artikolon pri la historia regiono Livonio.

Elŝutita el "https://eo.wikipedia.org/w/index.php?title=Livona_lingvo&oldid=5971168"

Ĉi tiu paĝo estis lastafoje redaktita je 10:13, 17 jul. 2016.

La teksto disponeblas laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite-Samkondiĉe 3.0 Neadaptita; eble aldonaj kondiĉoj aplikeblas. Vidu la uzkondiĉojn por detaloj.